


CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 119**

N-RO 20 (88), MAJO 2021

Enhavo

Originala poezio

Mikaelo Bronŝtejn

“En Peterburgo matena”	3
“Hej, kiom da antikorpoj”	3
“Mi kredas, ke, certe, eblas unu floranta ŝtato”	3

Datrevenooj de la rusa kulturo

200-jariĝo de Apollon Majkov

<i>Apolloon Majkov</i> . Tradukoj de <i>Klara Ilutoviĉ</i>	
“Printempo! Sen fenestroframo unua”	4
Alpaj glaĉeroj	4

Tradukita poezio

Irina Ratuŝinskaja. Tradukoj de *Tatjana Auderskaja*

En kretena jaketo...	5
Abrupte ŝanĝiĝis vento...	6
Ĉio, kion mi petis...	6
La ondo	7
Antaŭnokte...	8
Oni tempon konservis	8
Ho, nur ne pensi pri la voj' libera ...	9
Nu, ne tiel timige...	9

Tradukita prozo

<i>Aleksandr Kuprin</i> . Elefanto. Trad. <i>Gennadij Ŝlepĉenko</i>	10
---	----

Libroj

Esperanlingva libro tradukita al la portugala	18
“Tiu ĉumalofta sufikso -um”:	
nova libro senpage elŝutebla ĉe UEA	18

Originala poezio

Mikaelo Bronŝtejn (Tihvino)



En Peterburgo matena
tristo ne eblas. Apenaŭ
povus mi tristi en tia
milda mateno magia.
Grifoj, leonoj kaj ankaŭ
dorma domar' ĉe Fontanka
gapas al helaj radioj,
sunon renkontas hodiaŭ
respegulitan rivere.
En la akvar' efemere
ĉe l' sonorila ektinto
glitas fantomoj el into.

06.05.2021

Hej, kiom da antikorpoj
mi havas, jam vakcinita?
Ne gravas. Formanĝu porkoj
meditojn pri ben' subita,
sed mia animo restu
plu loĝi en mia korpo
kun certa viv-interes', do -
kun am' en senzorga koro.

08.05.2021


Mi kredas, ke, certe, eblas unu floranta ŝtato –
Dulingva kaj dueklezia – ĉu nesolvebla problemo?
Araboj kaj judoj ja povus vivi kun reciproka ŝato,
Respekt' reciproka, laboro kaj komprenemo.
Mi kredas, ke se unuigus siajn fortojn du etnoj
Por muldi, konstrui, poluri komunan feliĉan vivon,
Ekstus modela socio, kiun prikantus poetoj,
Kaj brilaj inventoj nepre riĉigus la perspektivon.



Mi kredas... Sed en realo oni instruas malamon,
Konstruas obusojn anstataŭ konstrui ĝojon,
Kaj nun prapatrujo mia travivas la samon,
Kovrintan dum ĉiuj jardekoj la novan vojon.
Gefratoj, araboj kaj judoj, kuraĝu al pac' reveni,
Forpelu l'kanajlojn, por kiuj milit' estas panjo kara,
Instruu infanojn la vivon en kuno konfida beni,
Kaj ben' reciproka alvenos de l'Sankta ter' malavara.

17.05.2021

Datrevenoj de la rusa kulturo



200-jariĝo de Apollon Majkov

Apollon Nikolaevič Majkov (23.05 [04.06] 1821 — 08.03 [20.03] 1897) estas nuntempe duonforgesita poeto. Tamen dum sia vivo li estis tre populara kaj oni komparis lin kun Puŝkin kaj foje diris, ke li estas pli talenta ol Lermontov! Kaj ne nur iuj hazardaj homoj, sed tiom gravaj kaj diversaj kompetentuloj pri literaturo, kiel Ĉerņiŝevskij, Nekrasov, Mereĵkovskij... Tamen lia estetika pozicio, adepto de kiu li estis – la “pura arto”, “la arto por la arto” – metis lin finfine sur la duan planon de la rusa poezio (aliaj adeptoj de la “pura arto”, kiel F. Tjutĉev kaj A.K. Tolstoj neniam estis sinsekvaj en siaj deklaroj, kaj tial estas bone memorataj), kaj li estus eĉ plene forgesita, se kelkaj brilaj rusaj komponistoj, kiel C. Kĵui, P. Ĉajkovskij kaj, precipe, N. Rimskij-Korsakov, ne uzus liajn poemojn por kreo de belaj kantoj kaj romancoj, dank’ al kiuj liaj poemoj estas plu memorataj kaj kun muzika akompano plenumataj. Cetere, estas tre interesa trajto de la poezio de Majkov, kio distingas lin de preskaŭ ĉiuj aliaj poetoj: li neniam ion verkis pri amo...

Весна! Выставляется первая рама —
И в комнату шум ворвался,
И благовест ближнего храма,
И говор народа, и стук колеса.

Мне в душу повеяло жизнью и волей:
Вон — даль голубая видна...
И хочется в поле, в широкое поле,
Где, шествуя, сыплет цветами весна!

1854

Альпийские ледники

Сырая мгла лежит в ущелье,
А там как призраки легки,
В стыдливом девственном веселье,
В багрянцах утра ледники!

Какою жизнью веет новой
Мне с этой снежной вышины,
Из этой чистой, бирюзовой
И света полной глубины!

Там, знаю, ужас обитает,
И нет людского там следа,—
Но сердце точно отвечает
На чей-то зов: "Туда! Туда!"

1858

Printempo! Sen fenestroframo unua
En ĉambrom impetus brud’,
El templo sonoro bonflua,
Parol’ de popolo kaj frapo de rad’.

L’ animon alvenis la viv’ kaj libero
Videblas helbluo de for’,
Mi volas al kampoj, al vastoj de tero
Kun flordisŝutanta printempa furor’.

Trad. Klara Ilutoviĉ (Elektrostalo)

Alpaj glaĉeroj

Malhel humidas intermonte,
Kaj, kiel en vizia kur’,
Glaĉeroj virgaj kvazaŭ honte
Jen ĝojas en matenpurpur’.

Je kia nova viv’ natura
Alblovas min la neĝa glim’
El tiu ĉi turkisa, pura
Kaj lumoplena neĝsublim’.

En tiu ejo de hororo?
Sen homaj spuroj, tute sen,
Kvazaŭ respondas mia koro
Ies vokadon: “Al tien’!”

Trad. Klara Ilutoviĉ (Elektrostalo)

Irina Ratuŝinskaja (1954-2017)¹

*Tradukoj de Tatjana Auderskaja
(Odeso)*



В идиотской курточке —
Бывшем детском пальто,
С головою, полной рифмованной
ерунды,
Я была в Одессе счастлива, как
никто —
Без полцарства, лошади и узды!

Я была в Одессе — кузнечиком на
руке:
Ни присяг, ни слёз, и не мерять
пудами соль!
Улетай, возвращайся —
Снимут любую боль
Пыльный донник, синь да мидии в
котелке.

Мои улицы мною стёрты до дыр,
Мои лестницы слизаны бегом во
весь опор,
Мои скалы блещут спинами из воды
И снесёт с Соборной площади мой
собор.

А когда я устану,
Но встанет собор, как был —
Я возьму билет обратно в один
конец:
В переулки, в тёплый вечер, в память
и пыль!
И моя цыганка мне продаст леденец.

En kretena jaketo...

En kretena jaketo, iam infana palt'
Kun la kapo, plena je bizara rimita
frazar',
En Odessa mi estis feliĉa sen fin', sen
kompar',
Sen ĉeval', sen regno kaj brido por
halt'.

En Odessa mi estis – lokusto sur stepa
flor'.
– Nek ĵuroj, nek larmoj, nek sal' por
kunviva daŭr'.
Vi forflugu, revenu – solviĝos ajna
dolor'
Pro meliloto polva, lazur' kaj mituloj
ĉe lignofajr'.

Miaj stratoj estas frotitaj de mia paŝ',
La ŝtuparoj platiĝis pro l' kur',
forlekitaj eĉ ĝis glaci',
Miaj rokoj brilas per dorsoj el mara
verdaĵ',
Kaj foreksplodita de l' Placo Tempa la
Templ' de mi.

Sed kiam mi laciĝos, sed resurektos la
Templ',
Mi prenos bileton reen, al hejma sin'.
Al stratetoj, al varma vespero, memor'
kaj hel',
Kaj kandon vendos al mi mia ciganin'.

¹ Informon pri Irina Ratuŝinskaja vd. en "Cerbe kaj kore" n-ro 10 (78), p.13

Abrupte ŝanĝiĝis vento...

Переменился ветер,
А новый самодержавен
Небо встало осадой
И пригороды берёт.
За северною стеною
Раскатом кони заржали,
Но первый поток прорвался
Сквозь брешь восточных ворот.
И сразу в дымном провале
Исчезли остатки башен,
Смело надвратную церковь,
Кресты и колокола.
Мой город сопротивлялся.
Он был прекрасен и страшен.
Он таял в ревушем небе,
Затопленный им дотла.
А позже, когда над нами
Сомкнулись тучи и воды, —
Никто не знал их победы
И не воспел зари.
И нет им с тех пор покоя:
Всё лепят, лепят кого-то —
То руку, то край одежды,
Бессильные повторить.

Всё, как я просила:
Будет мне, будет
(Господи, спасибо!)
Дальняя дорога
И новые люди.
Будет мне, будет
Бездомная песня
И гордая память.
Будет мне небо,
Добытое честью,
И плащ под стопами.
Будет мне —
Когда же —
Счастливая сказка
В полыни и мяте,
Платье, полумаска,
Кружевная пляска...
И никто не скажет:
— Пожила и хватит!

Abrupte ŝanĝiĝis vento.
La nova deziras venkon.
Sieĝas nin la ĉielo,
Konkeras suburbojn vent'?.
Ekhenis ĉevaloj tondre
Post muro dikega norda,
Sed rompis l' atak' unua
Remparojn de l' orient'.

Kaj tuj en la breĉo fuma
Pereis ruinaj turoj,
Falegis preĝeji' gardanta
Kun krucoj kaj ikonar'.
La urbo batalis arde,
Ĝi estis terura kaj bela,
Dum muĝe dronigis ĉielo
Restaĵojn de l' lasta rempar'.

Sed poste, kiam la akvoj
Kaj muroj desupre nin premis --
Neniu celebris venkon
Ilian kun glora kant'.
Kaj ili de tiam strebas
Imiti iun per modlo;
Sed nur detalojn sensecajn
Skizigas senpova man'...

Ĉio, kion mi petis...

Ĉio, kion mi petis,
Estos por mi, ja estos
(Dio mia, ho dankon!):
Kaj malbroksima vojo,
Kaj novaj homoj.
Estos por mi, ja estos
Kanto senhejma
Kaj memoro fiera.
Estos ĉielo
Kun la honoro
Kaj la mantelo
Sub piedoj miaj.
Estos ja --
— Ho, kiam? --
Fabelo feliĉa
En ment' kaj absinto.
Robo, masko punta
Kaj la danco bunta.
Kaj neniu diros:
Sufiĉe vi jam vivis!

Песня волны

Он оставил тебя и ушел ко мне —
Так в чем же моя вина?
И сколько ни стой у Белых Камней
—
Ты будешь стоять одна.
Так не мучь глаза на морском ветру,
Не ходи по кромке воды.
Я ведь снова, нахлынув, твой след
сотру,
Как и все другие следы.
Потому, что мой путь — на тысячи
лет —
Указал, Кто мог указать:
Чтобы мне возвращаться к этой
земле
И опять уходить назад.
И для звезд — закон, и для рыб —
закон,
И мужчине твоей страны
На роду написано быть рыбаком
До своей последней волны.
Он оставил тебя и ушел ко мне —
Ты же знаешь, как он упрям.
А если ласка моя солоней —
То он ее выбрал сам.
Я выкину трубку к Белым Камням,
Я вынесу янтарь.
Но только не требуй его у меня:
Теперь он в иных морях.
Я сама ему постелю кровать —
Из морского шелка траву,
Я стану в губы его целовать,
Но обратно не позову.
И ты не дождешься, но до седины,
До последней боли в груди,
По обычаю женщин твоей страны
Будешь к берегу приходить.
Ты ведь так же упряма, как он
упрям,
И конечно, когда-нибудь
Ты уйдешь за ним следом к иным
морям,
А я продолжу свой путь.
И продолжит путь ваш упрямый род
—
От берега, как и встарь.
И кто-то трубку его подберет,
Придя собирать янтарь.

La ondo

Li foriris al mi, forlasinte vin —
Ĉu mi kulpas pri io ajn?
Tiel gvidis lin spitema destin'.
Li iĝis nun mia gajn'.

Do ne staru vi apud mara rand',
Ne atendu ĉe Blanka Rok'
Mi forviŝos la spuron el sabla strand'
En eterna kaj gaja mok'.

Ĉar la vojo mia laŭ strikta ord'
Indikita estas en mar';
Mi venados plu al vilaĝa bord',
Kiel faris mi dum miljar'.

Kaj la saman ordon obeas lun'
Kaj fiŝoj, kaj vir' el vilaĝ'...
Li venadis al maro en vintr' kaj aŭtun',
Konstante, kun la kuraĝ'.

Li foriris al mi, forlasinte vin,
Ja vi scias, memstaras li.
Kaj pro sia neŝanceblebla obstin'
Min preferis al via lit'.

Mia lito el mara silka herbar',
Mi pretiĝis ĝin kun zorgem'...
Li foriris de vi al la fora mar',
Sed min li elektis mem!

Lian pipon forĵetos mi al la ĝet',
Mi sukcenon donos al vi,
Sed lin ne forlasos el silka ret' —
Li restos ĉiam kun mi!

Vi ne ĝisatendos lin, sed, en spit',
Vi venados al Blanka Rok',
Ĝis la grizaj haroj, la lasta spir'
Lin atendos en sama lok'.

Vi ja estas obstina en sama grad'
Kaj iam, al fora mar'
Vi postsekvos lin laŭ la sama pad'
Inter balanciĝanta ondar'.

Via gent' obstina al mara senlim'
Daŭrigos la vojon ĝis rand'...
Kaj iu trovos la pipon de li
Sur la sabla-sukcena strand'.

**«Перед боем кони щиплют клевер
на завтрашнем поле боя...»**

Перед боем
Кони щиплют клевер на завтрашнем
поле боя.
Полководцы
Меряют циркулями поля — выбирай
любое!
Не политы
Муравьиные тропы ещё ни свинцом,
ни кровью.
Только утром —
Грянет, и бледный всадник лицо
откроет.
Перед боем
Молодые солдаты слушают байки
старых.
Офицеры
Пишут письма, а после кто-то берёт
гитару.
Затихают
К ночи травы на поле боя, и пахнет
мёдом.
Только утром —
Грянет, и письма будут уже от
мёртвых.

**Научились, наверно, закатывать
время в консервы...»**

Научились, наверно, закатывать
время в консервы,
И сгущённую ночь подмешали во
все времена.
Этот век всё темней,
И не скоро придёт двадцать первый,
Чтоб стереть со вчерашней
тюремной стены имена.
Мы его нагружали ушедших друзей
голосами,
Нерождённых детей именами — для
новой стены.
Мы с такою любовью его снаряжали,
но сами
Мы ему не гребцы, даже на борт его
не званы.
Но отмеренный груз укрывая
рогожею грубой,
Мы ещё успеваем горстями просеять
зерно —
Чтоб изрзнить ладони, но выбрать
драконовы зубы
Из посева, которому встать после
нас суждено.

Antaŭnokte...

Antaŭnokte
Herbon pinĉas ĉevaloj sur kamp' de l'
morgaŭa batalo.
Militestroj
Per cirkeloj mezuras kampojn
eventualajn.
Kaj verŝiĝis
Sur la voj' formika ankoraŭ nek
plumbo, nek sango.
Nur matene –
Ektondros, kaj levos vizieron l'
raidanto kun palaj vangoj.
Antaŭnokte
Veteranoj dividas sperton kun junularo.
Oficioj
Skribas hejmen, kaj jen eksonis gitaro.
Silentiĝas
Por nokt' la herboj mielodoraj sur
kamp' despera.
Sed matene –
Ektondros, kaj jam de mortintoj estos
leteroj.

Oni tempon konservis...

Oni tempon konservis en form' de
likvaĵo dilua.
Kaj la nokton densegan almiksitis al tiu
buljon'.
La dudeka tenebras. Kaj foras la dudek
unua,
Forviŝonta la nomojn de l' muro de nia
prizon'.
Ni ĝin ŝarĝis per voĉoj de la pereintaj
amikoj.
Nomoj de nenaskitaj infanoj por nova
la mur'.
Ni ĝin tiel atendis, kun tia zorgemo
ekipis,
Sed ne rajtas ni remi nek flosi al fora
futur'.
Tamen ni, protektante per kruda
bastmato la grenon,
Ĝin sukcesas ankoraŭ kribradi kun la
inĝeni'.
Estu vundoj sur polmoj, sed dentojn de
l' drako forpreni
El la semoj, kreskontaj abunde en
tempoj post ni.

...Но только бы не думать о дороге

—
Прогретой, пыльной, чтоб идти,
идти!
Храни меня, храни, рассудок
строгий,
Не отпускай узды на полпути!
Ещё нам долго вместе отбиваться
От каторжных удушливых ночей,
Осторожных снов — почти
галлюцинаций,
Бессмысленных издёвок палачей,
Предательства уставших, и отравы
Их поцелуев... Сдохни, но снеси —
Не зная срока, не имея права
Сказать, что всё, что больше нету
сил!
Не позволяй слабеть, казни отказом
Ребяческое «больше не могу...»
В кромешный век — храни меня,
мой разум!
Храни — и я тебя уберегу.

Ну не то чтобы страшно,
А всё же не по себе.
И обидно: вдруг сына родить уже не
успею.
Потому что сердце сдаёт, и руки
слабеют —
Я держусь, Но они, проклятые, всё
слабей!
Я могла бы детские книжки писать,
И я лошадей любила,
И любила сидеть на загровке своей
скалы,
И умела, в море входя, рассчитывать
силы,
А когда рассчитывать не на что —
Всё же как-то доплыть.
Я ещё летала во сне, и мороз по коже
Проходил от мысли, что скоро и мне
пора.
Но уже прозвучало: «Если не я, то
кто же?»
Так давно прозвучало —
Мне было не выбирать!
Потому что стыдно весь век за чаями
спорить,
Потому что погибли лучшие всей
земли!
Помолитесь, отец Александр, за
ушедших в море,
И ещё за землю,
С которой они ушли.

Ho, nur ne pensi pri la voj' libera ...

Ho, nur ne pensi pri la voj' libera,
Por iri, paŝi larĝe, sen konvoj'!
Min gardu, mia intelek' severa,
Ne lasu min senbrida en mezvoj'!
Ankoraŭ longe spitu ni obstine
Al nokt' prizona, plena je sufok',
Al sonĝ' karcera, preskaŭ halucina,
Ekzekutista sadismema mok',
Perfid' de l' laciĝintaj, la veneno
De l' kis' ilia... Iru kontraŭ flu'
En morn' nebula, ĝis la vivmargeno,
Sen rajto diri: "Mi ne povas plu...".
Ne cedu al perfida emocio,
Rezistu al kapitulac-inklin'!
En temp' tenebra gardu min, racio!

Min gardu – tiam mi konservos vin.

...Nu, ne tiel timige ...

Nu, ne tiel timige, sed ia deprim' kaj
torp',
Kaj domaĝe, ke eble jam pasis ebleco
naski,
Ĉar febliĝas la brakoj, la kor' minacas
fiaski.
Mi min tenas, sed damne! – perfidas min
mia korp'.
Verki librojn por infanar' mi povintus, mi
ŝatis ĉevaloin.
Ŝatis sidi sur vert' de la roko mia en mar'.
Kaj scipovis pritaksi antaŭ naĝad' miajn
fortojn realajn.
Sed tamen alnaĝi iel, kiam la pritakson
difektis erar'.
Mi ankoraŭ flugis en sonĝ', kaj en sang'
leviĝis defio
Pro la pens', ke baldaŭ alvenos por mi la
vic'.
Sed jam estis dirite: "Ja se ne vi, do kiu?",
Jam delonge dirite, por mi ne eblis evit'.
Ĉar hontinda estas ĉe tabl' diskuto
senfara.
Ĉar pereas ĉiam plej bonaj de l' homa
uni'.
Preĝu vi, Patro Aleks, pro la navigantoj
en maro,
Kaj ankaŭ pro l' ter', forlasita por ĉiam de
ni.

Aleksandr Kuprin



Aleksandr Ivanoviĉ Kuprin (1870-1938) estas fama rusa verkisto-realisto, aŭtoro de famaj verkoj kiel "Duelo", "Grenata braceleto", "Olesja", kiuj laŭmerite plenigis la oran kolekton de rusa literaturo.

Aleksandr Kuprin naskiĝis en urbo Narovĉat de Penza regiono (Rusio) en malriĉa familio de ŝtata oficisto. En 1880 lia familio transloĝiĝis en Moskvo-n. Sesjara Kuprin iĝis klasano de Moskva pororfa lernejo, kiu li sukcese finis en 1880. Poste li lernis en milita akademio, Aleksandra milita liceo. En 1890 li militservis kiel subleŭtenanto en infanteria regimento. Dum la militservo li verkis

multajn rakontojn, novelojn. La novelo "Duelo" (1905) alportis al Aleksandr Kuprin grandan sukceson. Li verkis ankaŭ diversajn rakontojn por infanoj: "Elefanto", "Sturnoj", "Blanka pudelo", kaj la aliaj. Li ne konsentis kun politiko de milita komunismo, kaj elmigris en Francio-n. Nur post 17 jaroj li revenis en Rusio-n. En tiu tempo estis publikigita lasta rakonto de la verkisto "Gepatra Moskvo". Post akuta malsano li mortis en 1938, kaj estis entombigita en Leningrado (St.Peterburgo).

La elefanto

I

Eta knabino malsanas. Ĉiutage vizitas ŝin kuracisto Mihail Petroviĉ, kiun ŝi jam delonge konas. Iufoje krom li alvenas al ŝi ankoraŭ du nekonataj doktoroj. Ili turnas la knabinecon jen surdorsen, jen surventren, kaj, almetante la oreleon al ŝia korpo, ion aŭskultas, rigardas la okulojn, tirante malsupren ŝiaj palpebrojn. Dum la esploro ili kun severaj vizaĝoj iomete grave snufas, interparolas per nekonata lingvo.

Poste ili transiras el porinfana ĉambro en gastoĉambron, kie panjo atendas ilin. Ĉefa doktoro – altstatura, grizhara viro kun oraj okulvitroj – kun serioza mieno longe rakontas al ŝi pri io. Pordo ne estas fermita, kaj la knabino kuŝanta surlite, ĉion vidas kaj aŭdas. Ŝi ne komprenas multon, sed scias, ke temas pri ŝi. La panjo rigardas al la doktoro per la grandaj, lacaj, larmoplenaj okuloj. Dum adiaŭo la ĉefa doktoro laŭte diras:

– Estas tre grava, ke vi ne permesu al ŝi enui, kaj plenumu ĉiujn ŝiajn kapricojn.

– Ho ve, doktoro, sed ŝi volas nenion!

– Nu, mi ne scias... rememoru kio plaĉis al ŝi antaŭ la malsano: iuj ludiloj, dolĉaĵoj...

– Ne, doktoro, ŝi volas nenion...

– Nu, penu iel distri ŝin... Nu, per io... KREDU al mi, se vi sukcesos malenuigi, gajigi ŝin, tio estos la plej bona kuracilo. Komprenu min, via filino estas malsana ekskluzive pro apatio al la vivo. Ĝis revido, sinjorino!



II

– Mia ĉarma Nadja, amata knabino, – parolas la patrino, – ĉu vi volas ion?

– Ne, panjo, mi volas nenion.

– Se vi volas, mi dismetos sur via lito ĉiujn viajn pupojn kune kun etaj brakseĝo, sofo, tablo kaj samovaro. La pupoj trinkos teon, parolos pri vetero kaj sano de iliaj infanoj.

– Dankon, panjo... Mi ne volas... Mi enuas...

– Nu, bone, mia knabino, la pupoj ne necesas. Eble, mi voku por vi viajn amikinojn Kanjon kaj Ĵenjon? Vi ja tiel amas ilin.

– Ne necesas, panjo. Vere, ne necesas. Mi nenion, nenion volas. Mi tiel enuas!

– Se vi volas, mi alportos por vi ĉokoladon.

Sed la knabino ne respondas kaj rigardas al la plafono per la senmovaj, malgajaj okuloj. Nenio doloras en ŝia karno, kaj forestas alta temperaturo. Tamen post ĉiu tago ŝi pli kaj pli malfortiĝas kaj malgrasiĝas. Kion ajn oni faras por ŝi, ŝi ĉiam restis indiferenta al ĉio, kaj volis nenion. Kviete kuŝas ŝi tage-nokte ĉiam trista. Iafoje ŝi ekdormas por duonhoron, sed sonĝas ion grizan, daŭran kaj enuan, kiel aŭtuna pluvo.

Kiam la pordo inter porinfana ĉambro kaj gastoĉambro, kaj inter gastoĉambro kaj kabineto estas malfermitaj, la knabino vidas sian patron. La patro iras tien-reen tra la kabineto, kaj ĉiam fumas. Iafoje li vizitas la porinfanan ĉambro, eksidas ĉe la lito, kaj kviete karesas gambojn de Nadja. Poste ekstaras kaj proksimiĝas al fenestro. Li fajfetas ion, rigardas straton, sed liaj ŝultroj iomete skuiĝas. Poste li almetas poŝtukon komence al unu okulo, poste al la alia, kaj, kvazaŭ kolera, foriras en sian kabineton, kie denove paŝas tien-reen, kaj daŭre fumas. Pro la densa tabaka fumo la kabineto aspektas blukolora.

III

Jen iufoje matene la knabino vekigās iomete pli vigla ol ĉiam. Ŝi sonĝis ion, sed kion, ŝi ne povas rememori, kaj longe kaj atente rigardas en okulojn de la patrino.

– Ĉu al vi necesas io? – demandas la patrino.

Sed la knabino subite rememoras sian sonĝon, kaj kaŝe flustras:

– Panjo... mi volas...elefanton. Nur la elefanto devas esti viva, ne desegnita sur bildo. Ĉu eblas?

– Certe, mia knabino, certe eblas.

Ŝi iras en la kabineton, kaj diras al la patro, ke la knabino volas elefanton. La patro tuj surmetas palton, surkapigas ĉapelon, kaj forveturas ien. Post duonhora li revenas kun multekosta, bela ludilo. Ĝi estas granda griza elefanto, kiu memstare balancas la kapon, kaj svingas la voston. Sur la elefanto kuŝas ruĝa selo, sur kiu troviĝas ora tendo en kiu estas tri hometoj. Sed la knabino rigardas al la ludilo indifere, kiel al plafono kaj muroj, kaj pasive diras:

– Ne. Tion mi ne deziris. Mi volis naturan, vivan elefanton, sed tiu estas morta.

– Vi nur rigardu, Nadja, – la patro diras. – Nun ni startigos ĝin, kaj ĝi aspektos kiel tute viva.

Oni per eta ŝlosilo startigas la elefanton, kaj tiu balancante la kapon kaj svingante la voston, malrapide paŝas surtable. Sed la knabino tute ne interesiĝas pri tio, kaj eĉ enuas. Sed por ne aflikti la patron, ŝi humile flustras:

– Mi tre, tre dankas vin, kara paĉjo. Mi opinias, ke neniu havas la similan ludilon... Nur... ĉu vi memoras... vi jam delonge promesis al mi veturigi min en zoologian parkon por rigardi al viva elefanto... sed ne plenumis tion.

– Sed aŭskultu min, mia kara knabino, kaj komprenu, ke tio ne eblas. La elefanto estas tre granda, tre alta, kaj ne sukcesos situi tiun en niaj ĉambroj... Kaj, finfine, kie mi akiros ĝin?

– Paĉjo, mi ne bezonas tre grandan elefanton... Vi alveturigu al mi nur etan, sed vivan elefanton. Nu, ĝi estu miniatura kiel elefantido.

– Kara knabino, mi ĝoje pretas fari ĉion por vi, sed ĉi-tiun peton mi ne povas plenumi. Tio estus simila, se vi subite petus min akiri por vi la sunon de-sur la ĉielo.

La knabino triste ridetas.

– Kia vi estas stulta, paĉjo. Ĉu mi ne scias, ke akiri la sunon ne eblas, ĉar ĝi estas tro varmega? Ankaŭ ne eblas akiri la lunon. Ne, mi volas nur etan elefanton, sed... vivan.

Poste ŝi kviete fermas la okulojn kaj flustras:

– Mi laciĝis... Pardonu min, paĉjo...

La patro nerveze malordigas siajn kapharojn, kaj forkuras en la kabineton, kie kelktempe rapide iras tien-reen. Poste li ĵetas surplanken ne elfumatan ĝisfine cigaredon (pro tio la edzino ofte insultis lin), kaj krias al ĉambrestino:

– Olga! Palton kaj ĉapelon!

En la antaŭĉambro aperas la edzino.



– Kien vi iros, Aleksandro?
Li malfacile spiras, butonas sian pelton.
– Mi mem ne scias kien... Nur ŝajnas al mi, ke hodiaŭ vespere mi nepre kondukos al ni vivan elefanton.
La edzino maltrankvile rigardas al li.
– Kara, ĉu vi estas sana? Ĉu via kapo ne doloras? Povas esti vi malbone dormis?
– Mi tute ne dormis, – li korele respondas, – Mi vidas, ke vi volas demandi min, ĉu mi frenezigiĝis? Ĝis nun ankoraŭ ne. Ĝis revido! Vespere ĉio klariĝos.
Li malaperas, forte ferminte enirpordon.

IV

Post du horoj li jam sidas en menaĝerio, en unua vico, kaj rigardas kiel dresitaj bestoj laŭ ordono de la mastro plenumas diversajn taskojn. Saĝaj hundoj saltas, transkapiĝas, dancas, kantas akompane de muziko, kunmetas vortojn el grandaj kartonaj literoj. Simioj, vestitaj per ruĝaj jupoj kaj blujaj etaj pantalonoj, iras laŭ ŝnurego, kaj rajdas sur granda pudelo. Grandegaj rufaj leonoj trasaltas brulantajn ringojn. Malgracia foko pafas per pistolo. En fino de prezentado oni elkondukas tri elefantojn: unu estas granda, la du aliaj tre malgrandas, kiel nanoj, kvankam pli altaj ol ĉevalo. Strangas spekti, kiel la grandaj bestoj, laŭaspekte pezaj kaj malviglaj, plenumas plej malfacilajn artifikaĵojn, kiuj malfacilas eĉ por lerta homo. Tre distingiĝis plej granda elefanto. Ĝi komence staras sur la malantaŭaj kruroj, sidiĝas, surkapiĝas, paŝas sur lignaj boteloj kaj ruliĝantaj bareloj, per la rostro trafolumas grandan kartonan libron, kaj, finfine, sidiĝas ĉe tablo, kun buŝtuko surbruste, kaj komencas tagmanĝi, kiel bone edukita knabo.

La prezentado finiĝas, spektantoj disiras. La patro de Nadja aliras al dika germano, mastro de la menaĝerio. La mastro staras malantaŭ ligna sepo, kaj enbuŝe tenas grandan nigran cigaron.

– Pardonu min, – diras la patro de Nadja. – Ĉu vi povas portempe lasi vian elefanton en mia hejmo?

La germano pro miro vaste malfermas la okulojn kaj buŝon, kaj la cigaro falas surteren. Li ĝemante klinas sin, levas la cigaron, denove ŝovas ĝin en la buŝon, kaj nur poste eldiras:

– Ĉu lasi elefanton en la hejmo? Mi ne komprenas vin.

Laŭ la okuloj de la germano estas vidate, ke li ankaŭ volas demandi, ĉu doloras la kapo de la patro de Nadja... Sed la patro rapide klarigas situacion: lia sola infano, Nadja, suferas pro ia stranga malsano, pri kiu eĉ kuracistoj ne tute komprenas. Ŝi kuŝas surlite jam monaton, malgrasiĝas, ĉiutage malfortiĝas, interesiĝas pri nenio, enuas, kaj iom post iom estingiĝas ŝia vivo. La doktoroj konsilas distri ŝin, sed al ŝi plaĉas nenio; ili postulas plenumi ĉiujn ŝiajn dezirojn, sed ŝi volas nenion. Hodiaŭ ŝi ekdeziris vidi vivan elefanton. Ĉu eblas fari tion?

Per la fingroj li alkroĉiĝis al butono de palto de la germano, kaj per tremanta voĉo aldonis:

– Nu, jen... Mi, certe, esperas, ke mia knabino saniĝos, sed, kiu scias, la malsano povas progresi, kaj mia knabino mortos... Imagu nur, dum mia tuta vivo min ĉiam turmentos penso, ke mi ne plenumis ŝian lastan deziron!..

La germano morne enpensiĝas, gratas per la etfingro sian maldekstran brovon. Finfine li demandas:

- Hm...Sed kiomjara estas via filino?
- Sesjara.
- Hm... Mia Liza ankaŭ estas sesjara. Hm... Vi sciuj, ke la afero estos multekosta. Konduki la elefanton necesos nokte, kaj nur en sekva nokto oni devos forkonduki ĝin reen. Tage estas malpermesite, ĉar kolektiĝos homoj, kaj okazos skandalo... Do, mi perdos la tutan tagon, kaj vi devas kompensi miajn elspezojn.
- Ho, certe, sendube... ne maltrankviliĝu pri tio...
- Ankoraŭ: ĉu policistoj permesos alkonduki elefanton en domon?
- Mi ĉion aranĝos. Oni permesos.
- Ankoraŭ unu demando: ĉu mastro de via domo permesos alkonduki la elefanton en la domon?
- Li permesos, ĉar la mastro de la domo estas mi mem.
- Estas tre bone! Lastan demandon: en kiu etaĝo vi loĝas?
- En la dua.
- Hm... Tio ne estas tre bona... Ĉu vi havas en via domo larĝan ŝtuparon, altan plafonon, grandan ĉambron, vastan pardon kaj tre fortikan plankon? Mia elefanto Tommi estas alta je tri arŝinoj, longa je kvar arŝinoj, kaj pezas 112 pudojn.
- Patro de Nadja dum unu minuto enpenŝiĝas.
- Ni faros jenon! – li parolas, – Nun ni veturos al mia domo, kaj esplorigardos ĉion surloke. Se necesos, mi ordonos vastigi trairejojn en muroj.
- Tre bone! – konsentas la mastro de la menaĝerio.

V

- Nokte oni vizite kondukas la elefanton al la malsana knabino.
- Jen sub blanka ĉevalkovrilo ĝi grave paŝas sur mezo de strato, balancante la kapon, kaj jen tordas, jen maltordas la rostron. Kvankam jam estas malfrua tempo, ĉirkaŭ ĝi kolektiĝas homamaso. Sed la elefanto malatentas la homojn, ĉar ĝi ĉiutage vidas tiujn en la menaĝerio. Nur unu fojon ĝi iomete koleris.
- La strata knabo alkuris ĝin, kaj inter ĝiaj kruroj komencis grimaci antaŭ la publiko.
- Tiam la elefanto per la rostro demetis ĉapelon de la knabo, kaj transĵetis ĝin trans barilon, supre kovrita per pintintaj najloj.
- Policisto iras inter la homoj, kaj admonas tiujn:
- Sinjoroj, mi petas vin disiri. Kion vi trovis neordinaran? Ĉu vi neniam vidis vivan elefanton surstrate!?
- Oni aliras al la domo. Sur ŝtuparo, same kiel laŭ vojiro de la elefanto, ĝis manĝoĉambro mem, ĉiuj pordoj estas larĝe malfermitaj; por tio oni per martelo forigis pordajn riglilojn. Similan laboron oni faris kiam iam enportis miraklan ikonon en la domon.
- Sed antaŭ la pordo la elefanto maltrankvile haltas kaj komencas obstini.
- Necesas doni al li ian dolĉaĵon... – diras la germano. – Ian dolĉan bastonpanon aŭ... Ho, Tommi!.. O-ho-ho, Tommi!..
- Patro de Nadja kuras en najbaran panvendejon, kaj aĉetas grandan rondan, pistakan torton. La elefanto demonstras deziron tuj engluti ĝin kune kun kartona pako, sed la germano donas al ĝi nur kvaronon da torto. La torto tre plaĉas al Tommi, kaj ĝi tendas la rostron al dua peco de torto. Tamen la germano estas pli ruza. Enmane tenante pecon de la dolĉaĵo, li iom post iom altiĝas laŭ la ŝtuparo,

kaj la elefanto kun la tendita rostro, kun la disŝovitaj oreloj, devas sekvi lin. Sur placeto Tommi ricevas la duan pecon.

Tiamaniere oni alkondukas ĝin en manĝoĉambron, kie anticipi oni elportis meblaron, kaj planko estas dense kovrita per pajlo... Oni ligas ĝian piedon al ringo, ŝraŭbita en la plankon, kaj metas antaŭ ĝi freŝajn karotojn, brasikojn kaj rapojn. La germano apude situas sur sofo. Oni estingas lumon, kaj kuŝiĝas dormi.



VI

En sekva tago la knabino tre frue vekiĝas kaj tuj demandas:

– Sed elefanto, ĉu ĝi alvenis?

– Ĝi alvenis, – respondas la patrino, – sed ĝi ordonis, ke Nadja komence lavu sin, kaj poste formanĝu molkuiritan ovon, kaj eltrinku varman lakton.

– Sed ĉu ĝi estas bonkora?

– Jes, ĝi estas bonkora. Manĝu, knabineto. Nun ni iros al ĝi.

– Sed ĉu ĝi estas ridinda?

– Iomete. Surmetu varman bluzon.

La ovo estas rapide formanĝita, la lakto estas eltrinkita. Oni sidigas ŝin en saman infanĉareton, kiam ŝi estis infaneto, kaj ankoraŭ ne kapablis paŝi, kaj veturigas en la manĝoĉambron.

La elefanto aspektas pli granda, ol imagis Nadja, kiam vidis ĝin sur pentraĵo. Ĝia kresko iomete malpli alta ol alto de pordo. Laŭ longo la elefanto okupas duonon de la manĝoĉambro. Ĝia haŭto estas maldelikata kun profundaj haŭtfaldoj. La kruroj estas dikaj kiel fosto. La vosto longas, kaj en fino similas al balailo. La kapo estas kovrita de grandaj tuberoj. La oreloj grandas kiel arkteo, kaj pendas malsupren. La okuloj estas tre etaj, sed saĝaj kaj bonkoraj. La defendodontoj estas kurtigitaj. La rostro similas al longa serpento, kaj finiĝas per du naztruoj, inter kiuj troviĝas movebla kaj fleksebla fingro. Se la elefanto etendus la rostron, verŝajne tiu atingus la fenestron.

La knabino tute ne ektimas. Ŝi nur iomete konsterniĝas pro grandeco de la besto. Tamen vartistino, deksesjara Polja, komencas ŝriki pro timo.

Mastro de la elefanto, la germano, aliras al la infanĉareto, kaj diras:

– Bonan matenon, sinjorino. Mi petas vin, ne timu. Tommi estas tre bonkora, kaj amas infanojn.

La knabino etendas sian etan palan manon al la germano.

– Saluton, kiel vi fartas? – ŝi respondas. – Mi tute ne timas. Sed kia estas ĝia nomo?

– Tommi.

– Saluton, Tommi. – diras la knabino, kaj riverencas perkape. Pro tio, ke la elefanto estas tiel granda, ŝi ne decidiĝas cidiri al ĝi. – Kiel vi dormis ĉi-nokte?

Ŝi ankaŭ al ĝi etendas la manon. La elefanto tre singarde premas ŝiajn maldikajn fingrojn per sia movebla granda fingro, kaj faras tion pli tenere, ol doktoro Mihail Petroviĉ. Dum la premado ĝi balancas la kapon, kaj liaj okuloj iĝis tute mallarĝaj, kvazaŭ ili ridas.

– Ĉu ĝi komprenas ĉion? – demandas la knabino la germanon.

– Ho, tute ĉion, sinjorino!

– Ĝi nur ne scipovas paroli, ĉu?

– Jes, ĝi nur ne kapablas paroli. Mi ankaŭ havas unu filinon, same etan knabinon kiel vi. Ŝi nomiĝas Liza. Tommi estas ŝia amiko.

– Sed ĉu vi, Tommi, jam trinkis teon? – la knabino demandas la elefanton.

La elefanto denove etendas la rostron, kaj blovas per varma forta elspiro al vizaĝo mem de la knabino, kaj pro tio malpezaj haroj sur la kapo de la knabino disflugas diversflanken.

Nadja ridegas kaj aplaŭdas. La germano ridas. Li mem estas tiel granda, dika kaj bonkora kiel la elefanto, kaj al Nadja ŝajnas, ke ili ambaŭ similas unu al la alia. Verŝajne ili estas parencoj, ĉu?

– Ne, ĝi ne trinkis teon, sinjorino, sed ĝi plezure trinkas sukeran akvon. Al ĝi ankaŭ plaĉas bastonpano.

Oni alportas pleton kun la bastonpanoj. La knabino regalas la elefanton. Ĝi lerte prenas la bastonpanon per sia fingro, kaj, pleksinte ringe la rostron, puŝas la bastonpanon ien sub la kapo, kie moviĝas ridinda, triangula, vila malsupra lipo. Estas aŭdate kiel la bastonpano frotiĝas kontraŭ la seka haŭto. Poste Tommi formanĝas duan bastonpanon, la trian, kvaran, kvinan, kaj dankeme balancas la kapon, kaj ĝiaj etaj okuloj iĝas pli mallarĝaj pro plezuro. La knabino ĝoje ridegas.

Kiam ĉiuj bastonpanoj estas formanĝitaj, Nadja konatigas la elefanton kun siaj pupoj:

– Rigardu, Tommi, jen tiu belvestita pupo estas mia Sonjo. Ĝi estas tre bonanima infano, sed iomete kaprica, kaj ne volas manĝi supon. Jen tiu estas Nataŝa – filino de Sonjo. Ĝi komencas lerni, kaj scias preskaŭ ĉiujn literojn. Sed jen tiu – Matrjoŝka, mia plej unua pupo. Rigardu, ĝi ne havas la nazon, la kapo estas algluita, kaj mankas la haroj. Tamen ne indas forpeli la oldulinon el hejmo. Ĉu ne, Tommi? Antaŭe ĝi estis patrino de Sonjo, kaj nun ĝi servas en nia hejmo kiel kuiristino. Nun mi proponas ludi, Tommi: vi estos patro, kaj mi estos patrino. Sed la pupoj – niaj infanoj.

Tommi konsentas. Ĝi ridas, prenas Matrjoŝka-n je kolo, kaj tiras tiun en sian buŝon. Sed tio estas nur ŝerco. Iomete maĉinte la pupon, ĝi denove metas tiun sur la genuojn de la infano, kvankam iomete malsekan kaj ĉifitan.

Poste Nadja montras al ĝi grandan libron kun bildoj, kaj klarigas:

– Tio estas ĉevalo, tio – kanario, kaj tio estas pafilo... Jen kaĝo kun birdeto, jen sitelo, spegulo, forno, fosilo, kroniko.. Sed tio, rigardu, estas elefanto! Certe, ĝi ne estas simila al vi. Ĉu ekzistas tiaj malgrandaj elefantoj, Tommi?

Tommi konsentas, ke tiaj etaj elefantoj ne ekzistas sur la planedo, kaj la bildo ne plaĉas al ĝi. Ĝi prenas per la fingro randon de paĝo, kaj transturnas tiun.

Alvenas tempo por tagmanĝi, sed la knabino tute ne volas lasi la elefanton. Sed la germano solvas la problemon:

– Permesu al mi, mi ĉion organizos. Ili kune tagmanĝos.

Li ordonas al la elefanto sidiĝi. La elefanto obeeme sidiĝas. Pro tio planko en la loĝejo ektemas, tintas vazaro en telerŝranko, kaj en malsupra etaĝo ŝutiĝas stuko de sur plafono. Kontraŭ la elefanto sidiĝas la knabino. Inter ili oni starigas tablon. Al la elefanto oni alligas tablotukon ĉirkaŭ la kolo, kaj novaj amikoj komencas tagmanĝi. La knabino manĝas supren el kokaĵo, kaj kotleton. La elefanto manĝas diversajn legomojn kaj salaton. Al la knabino oni donas etan pokalon de ŝereo, kaj al la elefanto – varman akvon kun glaso de rumo, kaj ĝi kun granda plezuro per la rostro ensuĉas la trinkaĵon el bovlo. Poste ili ricevas dolĉaĵojn – la knabino tason da kakao, kaj la elefanto duonon de nuksa torto. Samtempe la germano kun la patro sidas en la gasteĉambro, kaj kun sama granda plezuro, kiel la elefanto, drinkas bieron en granda kvanto.

Post la tagmanĝo al la patro alvenas iuj liaj konatuloj. Jam en la antaŭĉambro oni avertas ilin pri elefanto, por ke tiuj ne timu. Komence ili ne kredas, sed poste, vidante Tommi-n, premiĝas al la pordo.

– Ne timu, ĝi estas bonkora! – la knabino kvietigas la konatulojn.

Sed la konatuloj rapide foriras en la gasteĉambro, kaj post malpli ol kvin minutoj forveturas.

Alvenas vespero. Jam malfruas, kaj la knabino devas dormi. Tamen oni ne povas ŝin detiri de la elefanto. Ŝi jam ekdormas apud ĝi, kaj oni forveturigas ŝin en la infanĉambro. Ŝi eĉ ne aŭdas, kiel oni senvestigas ŝin.

Ĉi-nokte Nadja sonĝas, ke ŝi edziniĝis kun Tommi, kaj ili havas multe da infanoj, etaj gajaj elefantoj. La elefanto, kiu ĉi-nokte revenis en la menaĝerion, ankaŭ sonĝas la karesan etan knabinon. Krome ĝi sonĝas grandajn nuksajn kaj pistakajn tortojn, kiuj grandas kiel pordegoj...

Matene la knabino vekigigas vigla, freŝa, kaj, kiel en antaŭa tempo, kiam ŝi estis sana, laŭte kaj malpacience krias tra la tuta domo:

– Lak-ton!

La patrino, kiu aŭdas la krion, ĝoje baptas sin en dormoĉambro.

Sed la knabino tuj rememoras hieraŭan tagon, kaj demandas:

– Kie estas la elefanto?

Oni klarigas al ŝi, ke la elefanto jam revenis hejmen, kaj ĝi havas infanojn, kiujn lasi ne estas permesite, kaj ke ĝi transdonas saluton al Nadja, kaj atendas ŝin kiel gasto, kiam ŝi estos sana.



La knabino ruze ridetas kaj diras:

– Komuniku al Tommi, ke mi estas jam tute sana!

Tradukis Gennadij Ŝlepĉenko (Vladivostoko)



Esperanlingva libro tradukita al la portugala



La libro de Nikolao Gudskov "Kiel la homo ekis pensi" (Moskvo, Impeto, 2012, 288 paĝoj, ISBN 978-5-7161-0235-4) estis tradukita kaj en elektronika formo (pdf-formate) eldonita en la portugala lingvo.

La tradukinto kaj eldoninto estas la portugala esperantisto *Luis Ladeira*. En la portugala la titolo estas "Como começámos a pensar criticamente", en la reto ĝi troveblas (kaj akireblas) laŭ la retadreso <https://verda.pt>

La esperanlingva eldono estas plu akirebla en la papera formo ĉe la eldonejo: http://lernolibro.ru/ekis_pensi

“Tiu ĉumalofta sufikso -um” : nova libro senpage elŝutebla ĉe UEA

Kafumi... gustumi? Cerbumi. Aferumi, esperantumi, simple: umi. La sufikso -UM estas speciala afikso de Esperanto, kiu kontribuas en nia lingvo por la granda esprimkapablo de Esperanto. Pri ĝi, ĵus bakita elektronike, nun disponeblas al la komunumo, tute senpage la libro “Tiu ĉumalofta sufikso -UM”, de Anatolo Gonĉarov, nova literatura frandaĵo pri la uzado de la sufikso, en eldono aŭspiciata de UEA: uea.org/l/teko/libroj/UM-Goncharov.pdf. La libro troveblas en la sekcio Teko de la retejo de UEA, kune kun aliaj senpage elŝuteblaj libroj: uea.org/teko/libroj.



La ruso Anatolo Gončarov estas honora membro de TEJO kaj la kolekton de tekstoj en la libro li kompiladis dum pli ol 50 jaroj. La nun disponigata elektronika libro estis preparita por lia 81-a datreveno, surbaze de la aŭtora manuskripto. La tekston enkomputiligis Svetlana Gončarova. Asistis Aŭgusto Atensjo. Aspektigis kaj enlibrigis Andrej Grigorjevskij. Anatolo Gončarov naskiĝis en 1940 (en Siberio, Sovetunio). Li eklernis Esperanton en 1958 dum la studentaj jaroj, kiam li jam komencis esplori la literaturon en Esperanto kaj elskribi interesajn uzojn de vortoj kaj gramatikajoj. En 1960 li

ekinstruis Esperanton kaj ĝis 1980 instruis ĉiujare. En 1965 li iniciatis fondon de SEJM (Sovetia Esperanto-Junulara Movado), en kiu li dum pluraj jaroj estis "la motoro". Dum diversaj vivoperiodoj Anatolo fondis ses E-klubojn (Odessa, Barnaul, Moskvo k.a.). En 1987, dum la perestrojka periodo, kiam eblis i.a. profesi! e enspezi pro Esperanto-agado li forlasis sian karieron kaj iris al Moskvo por profesie instrui Esperanton. Tio daŭris ĝis 1991, kiam Sovetunio finiĝis. Dum sia tuta aktiva vivo li multe studis, esploris, prelegis, artikolis kaj kunordigis agadojn pri Esperanto. Nuntempe li restas anime forta, sed fizike handikapita: Anatolo ne plu kapablas vidi. La prezentata kolekton de citaĵoj kun la uzoj de la sufikso -UM li kompiladis ekde la komenco de lia Esperanto-vivo: dum pli ol 50 jaroj. UEA dankas al Anatolo pro lia ekzempla agado kaj al ĉiuj liaj helpintoj. La Asocio estas tre honorita aŭspicii tiun eldonon kaj deziras al ĉiuj bonan ĝuoplenan legadon.



Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 952, 2021-05-15

CERBE kaj KORE

n-ro 20 (88), majo 2021

Kultura suplemento al la revuo "Ponto" n-ro 119

**"Ponto" estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "Rusia Esperantista Unio
Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de
ĝusta indiko de la fonto**

KcK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj sciencopopularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru.

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 18.05.2021